a. La normoj estas *nekompletaj*, t.e. ili permesas aŭ bezonas kompletigon aŭ suplementadon (*kadro-* aŭ *kernonormoj*). Ĉe la plenigo de normaj kadroj temas nur pri „privataj rekomendoj"; neniu estas devigata sekvi ilin.

b. Ekzistas pluraj konstituciaj decidorganoj, kiuj rajtas ŝanĝi kaj oficiale (t.e. ne nur kiel „privata rekomendo") suplementi la fundamentajn lingvajn normojn; vd. sub la punktoj 4 kaj 5.

Pro ĉio ĉi tio oni povus nomi ILon „parta planlingvo", aŭ „konstitucia lingvo". En la sfero de la bazaj lingvaj normoj, troviĝantaj en la Fundamento, ĝi estas planlingvo; ekster tiu sfero ĝi *ne* estas planlingvo (tamen kun kelkaj limigoj pritraktotaj). Ke en la efiko-sfero de tiuj bazaj normoj neniam povas esti allasataj spontaneaj ŝanĝoj, sed nur ŝanĝoj surbaze de decidoj de fake kaj institucie kompetentaj organoj, tio garantias, ke Esperanto malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj restas kerne planlingvo. Per la decidoj de la konstitucie rajtigitaj organoj la planlingva karaktero povas esti pliigita aŭ malpliigita.

4. La ILo-parolantaro kiel kriptoorganizaĵo

La priskribita konstitucia modelo de adaptiĝ- kaj evolukapabla (parta) planlingvo do postulas ne nur devigan lingvokodon, sed ankaŭ normojn pri institucioj, kiuj rajtas ŝanĝi kaj aldoni lingvajn normojn. Alivorte, la normoj, kiuj ebligas la funkciadon de tia lingvo, devas koncerni parte eksterlingvajn temojn, nome la institucian kadron. Fakte la konstitucio de ILo enhavas eksplicitajn pri-organizajn normojn.

Por multaj ILo-parolantoj estos tre surprize, ke jam Bulonja Deklaracio kaj Fundamento mem (ĉefe ties Antaŭparolo) konstitucie estigas ian organizaĵon de la ILo-parolantoj. Zamenhof ruze kreis kriptoorganizaĵon - supozeble, ĉar siatempe la ILo-parolantoj ne deziris esti korporacie organizitaj. La organizaĵo estis

kaj ĝenerale restis nerimarkita ĝis hodiaŭ, ĉar oni ne nomis ĝin organizaĵo. Tamen ĝi funkcias. La organizaĵo ne havas oficialan nomon; ni simple nomu ĝin *la ILo-parolantaro*. La ILo-parolantaro per si mem havas almenaŭ jenajn esencajn kaj nemalhaveblajn ecojn de organizaĵo:
- membraron,
- decidorganojn.

Por ambaŭ Bulonja Deklaracio kaj Fundamento donas klarajn, kaj parte mirige detalajn, regulojn, kiujn mi ankoraŭ prilumos.

Tiu ĉi organizaĵo de la ILo-parolantoj ekzistas *krom* kaj *sendepende de* aliaj organizaĵoj, kiuj uzas kaj/aŭ propagandas ILon, ekz. UEA, SAT ktp. Kiam la statutoj de tiaj organizaĵoj mencias la Fundamenton, tiam temas nur pri internaj normoj de tiuj organizaĵoj; tiuj normoj nek estigas nek limigas la validecon de la konstitucio de ILo. La konstitucio de ILo ja ankaŭ historie antaŭiris la diritajn organizaĵojn.

Kvankam la Fundamento kaj la ILo-parolantaro havas norme sendependan de tiuj organizaĵoj ekziston, tamen la sinligo de tiuj organizaĵoj al la Fundamento havas grandan praktikan valoron.

5. La unuopaj konstituciaj decidorganoj de la ILo-parolantaro

La konstitucio de ILo establis hierarkion de decidorganoj. Al la hierarkio de la organoj respondas respektiva hierarkio de la normoj faritaj de ili; tiel ke normo farita de hierarkie pli alta organo, okaze de kontraŭdiro, ĝenerale malvalidigas normon aŭ decidon de malpli alta organo.

Jen la decidorganoj, laŭrange ordigitaj:

5.1. La ILo-parolantaro

La ILo-parolantaro, do la „ILo-parolanta popolo“, estas la suvereno de „Esperantujo“, la spirita lando de sciantoj kaj uzantoj de la internacia lingvo (vd. §5 de la Bulonja Deklaracio).

Praktike tiu suvereno agas per kongresoj, kiuj do estas iaj konstitucidonaj kaj leĝodonaj kunvenoj. Sed la kongresoj povas havi tiun povon nur, kiam vere ĉiuj ILo-parolantoj (do la suvereno) partoprenas aŭ estas reprezentataj en ili.

Estis tiu suvereno, la „ILo-parolanta popolo“, kiu oficiale validigis la Bulonjan Deklaracion kaj la Fundamenton (vd. Antaŭporolo AI.2).

5.2. Aŭtoritata Komitato interkonsente elektita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj

La norma bazo de tio estas la Fundamento (AI.2), kiu jene tekstas: „Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala *leĝo* garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn dezirataјn ŝanĝojn, *se* tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj“. Tiu frazo de la Antaŭparolo tre precize fiksas la kondiĉojn de fondiĝo kaj la sferon de kompetenteco de tiu Komitato. Mi emfazas, ke por tiu decidorgano la Fundamento *ne* estas netuŝebla! Tion pliklarigas ankaŭ la sekvanta frazo AI.3, kiu jene tekstas: „Sed *ĝis tiu tempo* la fundamento de Esperanto devas plej severe esti absolute senŝanĝa...“.

Kiuj estas la „plej ĉefaj nacioj“, kies registaroj havas la rajton, elekti la aŭtoritatan komitaton?

- Je la tempo de Zamenhof oni havis sufiĉe klaran opinion pri tio: Temis pri la t.n. „pentarkio“, la koncerto de la kvin eŭropaj grandpotencoj post la Viena kongreso 1815. Al la pentarkio apartenis: Anglujo, Aŭstrio, Francujo, Prusujo (poste Germanujo), kaj Rusujo. Iliaj lingvoj estis: la franca, la angla, la germana, kaj la rusa. *Certe ne estas hazardo, ke temas pri la unuaj kvar lingvoj de la kvinlingva Fundamenta Gramatiko.* Ŝajnas eĉ, ke ilia vicordo tie sekvas la siatempan etiketan rangordon enkadre de la pentarkio.
- Hodiaŭ ni eble povas rigardi la konstantajn membrojn de la Konsilantaro pri Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj kiel la „plej ĉefajn naciojn“. Ties konstantaj membroj estas: Usono, Rusujo, Britujo, Francujo, Ĉinujo.

5.3. Aŭtoritata centra institucio (tradicie: Akademio de Esperanto)

Norma bazo: Fundamento A7.5, A8.1, A9.4. La sferon de kompetenteco fiksas A7.5, A8.1 kaj A10.4. La institucio rajtas, sub certaj kondiĉoj, enkonduki novajn vortojn kaj regulojn. A7.5 tekstas: „Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel *'Aldonon al la Fundamento'*.“

A9.4 precizigas la econ de la centra institucio: „Fari tion ĉi (post matura prijugado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro.“ Principe ĉiu institucio, kiu plenumas la kondiĉojn „aŭtoritata“ (rilate la lingvon) kaj „centra“, povus ludi tiun rolon. Konforme al la tradicio, la „Akademio de Esperanto“ ludas ĝin.

Gravegas, ke la „aŭtoritata centra institucio“ rajtas nur *„pligrandigi* (neniam *ŝanĝi*) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj“; vd. la resumon en Fundamento A10.4. Ĝi neniam povas revoki iujn oficialajn decidojn, ĉar tio estus pli kaj io alia ol pligrandigo de la Fundamento. Ankaŭ pro tio la institucio devas esti ekstreme singarda rilate tiujn decidojn, kiuj pligrandigas la Fundamenton. Fundamento A9.3 tekstas: „Ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco.“ El tiu frazo oni eble povus konkludi, ke facilanima decido de la institucio eĉ ne fariĝus leĝe valida.

Se la institucio dezirus, ke oni *ne plu* uzu iujn vortojn aŭ regulojn troviĝantajn en la Fundamento, ĝi povus doni nur privatan rekomendon sen leĝa sankcio.

5.4. La kreinto de ILo

Norma bazo estas §4, frazo 6 de la Bulonja Deklaracio. Ĝi jene tekstas: „Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.“ Per tiu normo Zamenhof ekhavis ian dumvivan rajton starigi modelojn de lingvostilo. Tiuj modeloj iel ŝvebas inter privateco - ĉar ili estas por neniu devigaj -, kaj oficialeco - ĉar ili estas oficiale, nome per la Bulonja Deklaracio mem, rekomendataj. Oni taŭge povus nomi ilin „duonoficialaj“.

Tiu duonoficiala „Zamenhofa stilo“ povas *nedevige* kompletigi la regulojn de la Fundamento. (Zamenhof emas kalkuli al la gramatiko nur tion, kio troviĝas en la 16 reguloj de la Fundamenta Gramatiko; ĉion alian li emas kalkuli al la „stilo“.)

Kaze de kolizio kun eksplicita aŭ implicita regulo de la Fundamento ankaŭ tio, kio troviĝas en la verkoj de Zamenhof, devas esti rigardata kiel malĝusta aŭ malbona, vd. ekz. Fundamento A3.4: „Ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem.“

6. Oficialaj fontoj kaj hierarkio de lingvaj normoj de ILo

6.1. Fundamento

Fontoj de *lingvaj normoj* de ILo estas: 1.) La 16-regula *gramatiko* (norma bazo: A2); 2.) la *„Universala Vortaro“* (norma bazo: A2); 3.) la *„Ekzercaro“* (norma bazo: A2); 4.) la oficialaj *„Aldonoj al la Fundamento“* (norma bazo: A7.5). La Antaŭparolo, kvankam apartenanta al la Fundamento, ne estas senpere lingvonormiga (gramatika, vortenkonduka) - ĝi mem rezervas tiun funkcion al la diritaj kvar partoj (vd. A2) -, sed „metagramatika“.

La diritaj kvar partoj estas tute samrangaj. La opinio, ke estas hierarkio inter ili (Ŝulco 1985a, b, 1991), ne havas norman bazon; Fundamento A2 sendistinge deklaras ilin *leĝoj*. La Ekzercaro jure ne estas nur „apliko“de la normoj de la Gramatiko: ĝia jura valideco ne dependas de la konformeco kun la Gramatiko, sed baziĝas senpere kaj egalrajte sur A2.

Io alia validas pri la ILo de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino: Ĝia statuto agnoskas nur la Gramatikon kaj la Universalan Vortaron kiel bazan kodon de la lingvo. Ĉar tia normo ne estas akordigebla kun A2, se ĝi ne estas nura rekomendo pri stilo, AIS per tio jure (kaj supozeble nevole) estigis propran planlingvon, preskaŭ-duoblaĵon de ILo, kies praktika lingvouzo sin tenas en la kadro de la Fundamento. Nur detala juroscienca analizo povos montri ĉiujn konsekvencojn de tiu normiga ago. Praktike la diferenco estas (ankoraŭ) tre malgranda, apenaŭ rimarkebla. Rilate la apartan ILon de AIS la menciita opinio de Ŝulco (1985a, b, 1991) estas akceptebla.

Ja povas ekzisti kolizioj inter la normoj de la Fundamento. Sed juroscience tio ne estas granda problemo: Eventualaj kolizioj inter la partoj de la Fundamento devas esti solvataj unuavice laŭ la eksplicitaj kaj implicitaj kolizisolvaj normoj de la Fundamento mem; kiam tiuj ne sufiĉas, oni uzu la ĝeneralajn jurosciencajn principojn, kiuj garantias senkontraŭdiran interpreton de normtekstoj:

- Laŭvola uzado de paralelaj formoj enkondukitaj laŭ Fundamento A8; ĉe tio la uzado de la nova formo estas *rekomendata*, sed ne deviga.
- Reguloj en la Ekzercaro, kiuj precizigas regulojn de la Gramatiko aŭ parte koincidas kun ili, havas la karakteron de stilaj reguloj. (Entute Zamenhof emas trakti ĉion, kio ne apartenas al la Fundamenta Gramatiko, kiel nuran stilan demandon). La stilaj reguloj de la Ekzercaro koncernas nur la prozon, ne la poezion.
- „Lex specialis derogat legi generali“, t.e. pli speciala normo (escepto-regulo), kaze de kolizio, sur sia tereno malvalidigas ĝeneralan normon (regulon); sed oni restrikte interpretu la malvalidigon.
- k.t.p.

6.2. Verkoj de Zamenhof

Lingvaj modeloj de Zamenhof, kiuj ne apartenas al la lingvonormigaj partoj de la Fundamento, estas rekomendataj, sed *nedevigaj* (vd. §4 frazo 6 de la Bulonja Deklaracio kaj la suprajn konsiderojn pri la instituciaj rajtoj de Zamenhof). La Fundamento, kaze de kolizioj, malvalidigas la lingvouzon de Zamenhof en aliaj verkoj; vd. Fundamento A3.4

7. La procedo en dubaj kazoj

En dubaj kazoj oni sisteme kaj korekte serĉu la solvon laŭ jena maniero:

Paŝo 1 : Konsultado de la Fundamento; se necese, *interpretado:*

- T.n. „gramatika“(pli bone eble: „semantika“) interpretado: Eliras de la esprimmaniero de la Fundamento kaj provas ekkoni la sencon de la normo el la lingva formo. Ĉe tio oni eliru de la ĝenerala lingvouzo, la ĝenerala lingvojura terminologio aŭ de la speciala terminologio de la Fundamento; la apartaĵoj de teknikaj terminoj devas esti atentataj.
- Logika interpretado: Provas eltrovi sencon kaj celon de la Fundamento, kaj el la kunteksto dedukti la sencon de la unuopa normo kaj ties specialan celon (teleologia metodo).

Se la interpretado ne rezultigas solvon de la problemo, tiam temas pri mankanta normo, kaj oni transiru al paŝo 2.

Paŝo 2 : Enkonduko de la mankanta normo laŭ propra bontrovo, konforme al la permeso donita de §4 frazo 5 de la Bulonja Deklaracio.
Principe do eblas *pluraj* variantoj aŭ dialektoj de ILo, kiuj ĉiuj estas fundamentkonformaj.
Sed la libero de tiu „propra bontrovo" estas limigita de certaj gravaj normoj. La leĝa celo de ILo, eksplicite formulita en §1.1 de la Bulonja Deklaracio (pli ideologia versio de tiu celo estas la t.n. „interna ideo") konkretiĝas en hierarkio de bazaj „lingvoteknologiaj" postuloj, kiujn plenumu internacia lingvo. Mi supozas, ke ion similan celas ankaŭ Stachowiak (1985), rekomendante „sisteman pragmatikon". La enkondukota normo konformu al tiuj postuloj.
Tiaj postuloj, provizore ordigitaj laŭ graveco, estas por ekzemplo:

- unueco
- stabileco
- klareco (Popper 1980), facila komprenebleco
- facila lernebleco
- reguleco (t.n. „logikeco". malmulteco de esceptoj)
- malmulteco de reguloj
- fleksebleco
- viveco
- beleco
- mallongeco.

Tiuj postuloj parte koincidas, parte kontraŭdiras unuj al la aliaj. La solvo tial povas esti ĉiam nur optimuma kompromiso. *Absoluta perfekteco estas neatingebla, ja eĉ nedezirinda* (Welger 1981). Kiam unu el du kontraŭdiraj postuloj estas perfekte plenumita, tiam suferas la kontraŭa. Ju pli grava postuloj estas perfekte plenumita, tiam suferas la kontraŭa. Ju pli grava estas iu postulo, des pli gravas ĝia relativa perfekteco. Mezuro de la graveco estas la grado, en kiu la koncerna eco kontribuas al la celo de la lingvo: Esti kiel eble plej taŭga internacia lingvo.
Kiam la bazaj postuloj ne tute klare sugestas ion alian, tiam oni sekvu pro la unueco de la lingvo unuavice la regantan lingvouzon, duavice la lingvouzon de Zamenhof. Kompreneble tio estas nur rekomendo.

8. Pri la rolo de la logiko

Apartan pritrakton meritas la temo „logiko", ĉar kelkfoje ekzistas eraraj opinioj, kion logiko kapablas kaj kion ne.

Por veni al konkludoj, oni bezonas premisojn. Se la konkludo estu normo (regulo), tiam almenaŭ unu el la premisoj jam devas esti normo (regulo). Sole el faktoj oni ne povas dedukti normojn. (Ni ĉi tie parolas pri sociaj normoj, ne pri la t.n. „naturoleĝoj", kiuj nur metafore povas esti nomataj „leĝoj".) La Fundamento estas por ni ILo-parolantoj la „libro de normaj premisoj". La demando pri la ĝusteco de tiuj premisoj ne stariĝas, ĉar ĉe normoj ne temas pri ĝusteco aŭ malĝusteco, sed pri valideco aŭ nevalideco. Ĉiuj normoj de la Fundamento estas leĝe validaj ekde la 9-a de aŭgusto 1905, kiam la unua internacia kongreso de ILo-parolantoj decidis tion. Logika konkludo el tiuj premisoj ne estas kreado de novaj reguloj, sed nur la eksplicitigo de eventuale implicitaj, jam estantaj reguloj. La logiko ne povas krei ion esence novan.

Ŝulco (1985b) trotaksas la eblecojn de la logiko, opiniante, ke la „Kvinlingva Gramatiko vere permesas per apliko de la logiko determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj". Estas grave, ke oni konsciiĝu, ke la solvo de lingvaj demandoj ofte *ne* eblas per logika deduktado, ĉar la Fundamento simple ne entenas la bezonatajn premisajn normojn; tiel ke oni devas racie inventi - laŭ la supre priskribita paŝo 2 - novajn (ĝenerale neoficialajn) regulojn. Bedaŭrinde interpretantoj de la Fundamento ofte ne sufiĉe zorge konsciigas al si, kio fakte troviĝas en la Fundamento. Ili projekcias siajn proprajn ideojn, pensokutimojn, subkomprenaĵojn, „memkompreneblaĵojn" en la Fundamenton, kaj poste „logike" eltiras ĉion ĉi tion el la teksto - prestidigitista artifiko, kiu ofte restas nerimarkata de tiuj interpretantoj.

Ĉi tie ni diru kelkajn vortojn pri la Zamenhofa uzo de la vorto „logiko". Li ofte uzis tiun vorton, kaj la kunteksto ĝenerale montras, ke ne temas pri strikta deduktado el donitaj premisoj, sed pri io, kion oni prefere nomu „raciigo" aŭ „prudenta reguligo". En tiu iom (tro) vasta senco, por ekzemplo, rektigita rivero estas pli „logika" ol meandra; ŝaktabule konstruita urbo pli „logika" ol urbo havanta kurbajn kaj kaŝitajn stratetojn. Estiĝas tre tipaj miskomprenoj kaj la konataj senĉesaj polemikaj debatoj, kiam oni tiun procedon de raciigo kaj prudenta reguligo simple identigas kun strikta logika deduktado. Sub la sugestio de la prestiĝa nocio „logiko" iuj erare opinias, ke ili povas „logike pruvi" sian pravecon, dum fakte temas nur pri certaj konsideroj prudentaj, kiuj principe neniel povas estigi „unusolan nerefuteblan veron".

Mi rekomendas uzi la vorton „logiko" nur tiam, kiam temas en strikta, teknika senco pri logiko. Ni ne sekvu la ekzemplon de Zamenhof, kiu bedaŭrinde ofte - ankaŭ en la Lingvaj Respondoj (Zamenhof 1962) - uzis ĝin en sufiĉe vasta, nepreciza senco.

Literaturo

FRANK, H.: Zur kybernetische Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik, GrkG/ Humankybernetik 1985/2, p. 71 - 82

FRANK, H., YASHOVARDHAN, V. BARANDOVSKÁ: Kiel utile difini la nocion „Interlingvistiko"? GrKG/Humankybernetik 1991/4, p. 182 - 185

KALOCSAY, K., G. WARINGHIEN: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. Rotterdam, Universala Esperanto-Asocio, 4-a eldono, 1980

POPPER, K.R.: Die offene Gesellschaft und ihre Feinde, Bd. 2, München, A. Francke, 6. Auflage, 1980, p. 389

ŜULCO (SCHULZ), R.: La esenco de la Analiza Skolo. Paderborn, Esperanto-Centro, 1991

ŜULCO (SCHULZ), R.: Noto pri la scienceco de la internacia lingvo, GrKG/Humankybernetik 1985/1, p. 31 - 37

ŜULCO (SCHULZ), R.: Notoj pri la aksiomado de la internacia lingvo, GrKG/Humankybernetik 1985/3, p. 130

STACHOWIAK, H.: Methodologische Bemerkungen zur Axiomatisierung der Interlinguistik, GrKG/Humankybernetik 1985/2, p. 82 - 85

STACHOWIAK, H.: Gedanken zu einer pragmatischen Theorie der Interlinguistik, GrKG 1986/1, p. 3 - 11

STACHOWIAK, H.: Interlinguistische Theorie im „non statement view", GrKG/Humankybernetik 1987/1, p. 11 - 18

WELGER, H.: Pri la dezirendaj (!) neperfektaĵoj de planlingvo, Naturista Vivo n-ro 6/7, 1981, p. 27 - 30

ZAMENHOF, L.: Fundamento de Esperanto. Marmande, Esperantaj Francaj Eldonoj, 9-a eldono, 1963

ZAMENHOF, L.: Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. Marmande, Esperantaj Francaj Eldonoj, 6-a eldono, 1962

Alveninta la 11-an de februaro 1992

Adreso de la aŭtoro: Rechtsanwalt/Dipl.-Psych. Helmut Welger, Bismarckstr. 28, D-W-3550 Marburg

Kurze Einführung in das Verfassungsrecht der Internationalen Sprache (Knapptext)

Das „Fundamento de Esperanto" definiert sich selbst als „Gesetz". Der vorliegende Artikel wertet u.a. deshalb die rechtswissenschaftliche Methodologie als unverzichtbare Hilfswissenschaft der Interlinguistik und untersucht aus diesem Blickwinkel die Grundnormen der Internationalen Sprache. Dabei werden die Konturen einer „Plansprachenverfassungslehre" erkennbar, die über bloßen Konventionalismus hinausgeht und auch zur Technologie der Sprachplanung einen substantiellen Beitrag zu leisten vermag. Ferner ergibt sich, daß einige vieldiskutierte Probleme auf diese Weise leicht gelöst werden können, ohne große Teile des Fundamento gewaltsam wegzuinterpretieren oder wegzunormieren: So erweisen sich im Lichte dieser Methoden z.B. die (nicht sehr zahlreichen) „Widersprüche" des Fundamento schlicht als Regel-Ausnahme-Verhältnisse (wobei die Ausnahmen als Ausnahme-Regeln zu verstehen sind).

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Laŭjura sidejo en la Respubliko de San Marino

Prezidanta Sekretariejo:Kleinenberger Weg 16B,D-W-4790 Paderborn,Tel. (0049-/0-)5251-64200

Subtene Sektoro:p.a.ADoc.L.Weeser-Krell prof.,Herbramer Weg 9,D-4790 Paderborn & OProf.Mario Grego prof.dott., Casella Postale 116, I-30100 Venezia

Finredaktita: 1992-03-05 Redakcia respondeco:OProf.Dr.H.Frank

Gemäß § 8 der Satzung der AIS Deutschland hatte am Sonntag, 17. November 1991, die Mitgliederversammlung 1991 stattzufinden. Bei dieser Versammlung ergaben sich keine Einwände gegen die Abschlußrechnung 1990. Die Vorstandswahl für die Jahre 1992 - 1993 fand nicht statt. Sie wird anläßlich der AIS Studientagung in Prag-Brandys am Sonntag, 29. März 1992 um 9 - 11 Uhr an der pädagogischen Fakultät in Brandýs, Královická 915, durgeführt, wobei auch schon der Jahresabschluß 1991 vorgelegt wird. Zu dieser Versammlung werden hiermit alle Mitglieder und Fördermitglieder der AIS Deutschland eingeladen.

Prof.Dr.H.Frank
Vorsitzender

Nova konto de AIS ĉe ĈAIS

Post la fondo de ĈAIS – la ĉeĥa landa organizo de la Akademio Internacia de la Sciencoj estis por ĝiaj celoj malfermita ekde la unua de oktobro 1991 la bankkonto por enpagoj en germanaj markoj ĉe Komerční Banka, Pobočka Praha-Centrum, Na říkopě 3-5, CS-11003 Praha 1 kun la numero: 34278-1804452-111.

La 11a Sanmarina Universitata Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj, okazonta kompreneble en Respubliko San Marino, komenciĝos la 29an de aŭgusto (per lingvokursoj) finante post la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro la 6an de septembro 1992. Dum la sesio Vi havos eblon partopreni en kursoj, prelegserioj, aŭskulti prelegojn en la sekcioj Kibernetiko, Humanistiko, Struktursciencoj, Filozofio, Natursciencoj kaj Morfosciencoj.

Kvankam la **limdato** por proponi sian kontribuon (per lekci-e/a-ro) (bv.nepre pere de dekanoj de la koncerna sekcio, laŭ la listigo troviĝanta en GrkG 4, 1991 !) **pasas la 30an de aprilo 1992, ekagu tuj** - antaŭ Vi restas nur unu monato! Nur laŭ la restunta libera tempointervalo eblos laŭ surloka akcepto de prelegpropono (pere de dekanoj) disponigi po 15 minutoj por koncizprelegoj. Bv.atenti, ke aliĝo estas konsiderota nur post la alveno de Via aliĝkotizo. Ĝis la 30a de junio 1992 **pagenda aliĝkotizo estas 30,- DM** aŭ 22.500 LIT (ankaŭ por lekciestroj, redono nur post la laŭprograma realigo). Post tiu termino ĝi altiĝas al 50,-DM. Se Vi ankoraŭ ne plenumis tiun formalaĵon – ne prokrastu plu! La kotizon ĝiru la plej bone al la **poŝtĝirokonto 2051-305 ĉe poŝtĝiro-oficejo Hannover (bankkodo 25010030)** aŭ al la konto 712 ĉe Banca Agricole Commerciale en San Marino (ĉi-kaze nepre sendu kune kun la aliĝilo la kopion de la ĝirilo al la Prezidanta Sekretariejo (Kleinenberger Weg 16b, D-W-4790 Paderborn). Pagante ĉeke bv. aldoni 0,15 AKU (15,-DM, 11.250 LIT aŭ egalvaroron) por la bankkostoj. Tiu ĉi kotizo lasas al Vi eblecon senpage partopreni la sciencajn kursojn (ankaŭ la lingvajn), prelegseriojn, debut-, gast-, kandidatprelegojn kaj liberajn prelegojn, ĉeesti ekzamenigojn – ricevinte komence programkajeron kaj, post la SUS-fino – la partoprenliston.

Aparta atentigo al ĉiuj kandidatoj – la unua limdato por reguli la ekzamenkotizon sen malfruiĝa aldono pasos la **31an de marto 1992** ! Ĝi estas samtempe la limdato por ankoraŭ anonci sin kiel kandidato dum la sanmarina sesio. Ne hezitu do, ĉar sekvontfoje signifas plejverŝajne nur venontjare! Kaj Vi jam ĉi-septembre havos eblecon sekvi kelkajn el kursoj, ekzemple pri „Aŭtogena trejnado" realigota de PDoc.H.Eichhorn dr., „Elektitaj verkoj de Komenio II" de ADoc.Dr.V.Barandovská-Frank, „El la historio de la rusa pentro arto" de PDoc.N.Korĵenevskaja dr., „Enkonduko en la aŭtomatan traktadon de natura lingvo" de OProf.C.Minnaja dr., „Ekologia astronomio" de OProf.H.M.Maitzen dr.hab., „Medicina scienca nomenklaturo" de OProf.R.Sachs dr., „Turismiko" de OProf.M.Grego dr., „Paralela lingva kaj muzika instruado - teorie kaj praktike" de prof.^{AS} Dimitar Terziev k.a.

Kadre de AIS okazos ĉi-jare en Pollando:

- ≫ **1992.05.16-23 intersekcia studadsesio en Krynica** kun la sesi-temo „La homo antaŭ modifoj de la medio". Pli-informiĝu ĉe OProf.Dr.habil.Tyburcjusz Tyblewski (ul.Bartka Zwycięzcy 11/1, PL-58500 Jelenia Góra)
- ≫ **1992.09.18-26 scienca universitata sesio en Białystok** (sidejo de la Pola Filio de AIS, p.a. Politechnika Białostocka, ul.Wiejska 45a, PL-15-351 Białystok) pri la temo „Humanistiko" (precipe interlingvistiko, pedagogio, sociaj sciencoj). La aliĝkotizo estas 0,3 AKU (DM 30,- aŭ 210.000zł), same kurspartoprenatesto, plenaj restadkostoj (tranoktoj, manĝoj) – laŭ aliĝo ĝis 30.04.1992 - 1,2 AKU (DM 120,- aŭ 840.000zł), ĝis 31.07.1992 - 1,4 AKU (DM 140,- aŭ 960.000zł), poste - 1,6 AKU (DM 160,- aŭ 1.140.000zł).

Science, kulture, nov(ortodoks)jare en Moskvo kaj Sankt Peterburgo

Fine de lasta jaro 1991.12.29 - 1992.01.08 ĵus en tute novaj politikaj cirkonstancoj, eksplanita jam antaŭ du jaroj, okazis la unua rusa AIS-sesio RAISS kun la temo „Lingvo–Kulturo–Ekologio". Ĉirkaŭ 200 partoprenintoj el 18 landoj havis eblecon sekvi kursojn kaj prelegojn plenigintaj la sciencan parton de la sesio. Abunde kaj interese prezentiĝis la kultura programo, en Moskvo kaj Sankt Peterburgo. La rezulto de la konferenco estas resumita en la sube prezentata **„Rezolucio de la Rusa Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj"**:

Dum la unua Rusa AIS-sesio, okazinta sub aŭspicio de UNESCO kadre de la Monda Jardeko por Kultura Evoluo, prezentata multajn sciencajn kaj publikajn organizaĵojn de Rusio, Ukraino, Belorusio, Latvio, Estonio, Litovio, Kazaĥio, Uzbekio, Ŧaĝikio, Germanio, Italio, San Marino, Pollando, Nederlando, Rumanio, Ĉinio, Svedio oni pridiskutis komplekson de ekologiaj, spiritaj, lingvistikaj kaj sociaj problemoj.

1. La sesio atentigas la registarojn, sciencajn kaj publikajn organizaĵojn de ĉiuj landoj pri tio, ke por estonteco de la homaro tri ĉefaj sferoj de ties vivagado – la natura, la socia kaj la spirita – estas nedisigeblaj kaj samgravaj, kaj alvokas ĉiujn kontribui al la teoria analizo kaj praktika realigo de la triunuo „Lingvo–Kulturo–Ekologio".

2. La unua Rusa AIS-sesio turnas sin al la Supera Soveto laj Registaro de Rusio kun propono meti en la novan Konstitucion de la lando paragrafon pri rajto de ĉiu civitano vivi en la favora medio: natura, socia kaj spirita.

3. Ĉe solvado de la problemoj de la harmonia evoluo de al homaro gravan rolon ludas internaciaj lingvoj, inter ili speciale kreitaj por internacia komunikado, unuavice la Internacia Lingvo (Esperanto). Unu el influaj faktoroj por evoluigo de la esperanto-movado kaj movado por la ekologio kaj kulturo povus esti speciala gazeto kun konstantaj rubrikoj „Lingvo", „Kulturo", „Ekologio" kiel organo de la Rusa AIS-Filio.

4. La sesio notas la aktualecon kaj praktikan signifon de la prezentitaj prelegoj kaj rekomendas ilian publikigon.

5. La partoprenintoj de la sesio esprimas dankon al la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino pro konsento sesii en Rusio kaj al la Centro „Esperanto-Kulturo-Ekologio" ĉe la Rusia Akademio de Ekranoj kaj Artoj kaj al la organiza komitato pro la sukcesa okazigo.

Aparte menciendaestas granda kontribuo de Dr.Lev Medvedev, direktoro de la Centro kaj de la sesio. Ni esperas, ke agado de AIS en Rusio iĝos daŭra kaj bona tradicio utila por la popoloj de Rusio kaj de la tuta mondo.

Mitteilungen des Instituts für Kybernetik Berlin e.V.
Direktor: Prof. Dr. Uwe Lehnert

Freie Universität, ZI7-WE3, Habelschwerdter Allee 45, D-1000 Berlin 33
Bankverbindungen: Konto Nr. 6123037500 bei der Berliner Bank, BLZ 100 200 00
Postgirokonto 477537-102 1000 Berlin, BLZ 100 100 10
und (als Unterkonto) bei der AIS Deutschland, Postgirokonto 2051-305 Hannover, BLZ 250 100 30

Protokoll der ordentlichen Mitgliederversammlung des Instituts für Kybernetik Berlin e.V.

Ort: Nürnberger Stuben im Europa-Center
Zeit: 15. Dez. 1991, 17.00 h - 18.35 h

Tagesordnung:

1. Regularien
2. Bericht des Vorsitzenden
3. Entlastung
4. Wahlen
5. Verschiedenes

TOP 1) Gegen die Ordnungsmäßigkeit der Einladung und die Tagesordnung wurden keine Einwände vorgebracht.

TOP 2) Prof. Lehnert berichtete über die Aktivitäten des Vereins. Da einige neue Mitglieder anwesend waren, erfolgte eine ausführliche Darstellung des Vereinsziels und der Geschichte der Vereinszeitschrift "Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft".

TOP 3) Die vorbildliche Kassenführung von Frau Ehmke wurde ausdrücklich gelobt. Dem Antrag auf Entlastung des Vorstands wurde zugestimmt.

TOP 4) Zum neuen 1. Vorsitzenden wurde in offener Abstimmung Prof. Dr. Horst Völz, Koppenstr. 59, D-0-1017 Berlin, gewählt.

TOP 5) Prof. Dr. H. Frank berichtete über seine jüngsten wissenschaftlichen Kontakte in der Tschechoslowakei und in Rumänien.
Berlin, 17. Dez. 1991

Prof. Dr. Uwe Lehnert

TAKIS - Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko

Prezidanto: D-ro Dan MAXWELL, p.a. BSO/Language Technology, poŝtkesto 543, NL-3740 AM Baarn (Nederlando)
Ĝenerale Sekretario: Inĝ Milan Zvara, Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotské nám 6, CS-05801 Poprad
Konto: Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, „Subkonto TAKIS" de la poŝtĝira konto 2051-305 Hannover (D), Bankkodo (BLZ) 250 100 30

en februaro 1992

Kunsido de TAKIS, Moskvo, 04-01-92

Estimataj kolegoj,
La nova jaro estas oficiale ripozjaro por TAKIS: ne okazos oficiala kongreso. Anstataŭe ni subtenas la kongreson de nia gefrata asocio AIC (Association Internationale de Cybernétique), kies 13-a kongreso okazos la 24-an ĝis la 29-an de aŭgusto en Namur, Belgio. La sekcio pri humankibernetiko permesas prelegojn ne nur en la franca kaj la angla, kiel en aliaj sekcioj, sed ankaŭ en ILo. Provizora programo por sesioj en tiu sesio estas inkludita kun tiu novaĵletero.
Tamen necesas jam nun ekokupiĝi pri kongreso dum la venonta jaro, nome INTRKIBERNETIK '93. Tio estos nia 4-a „vaganta" kongreso, post Budapeŝto en 1985, Tarragona en 1987, kaj en Poprad en 1990. Okazis TAKIS-kunsido dum la antaŭnelonge okazinta sesio de AIS en Moskvo. Kiel vi povas legi en la kunsendita protokolo, tie estiĝis propono, ke Interkibernetik '93 estu organizita en IAŞI, Rumanio. TAKISanoj Preotu kaj Vrăjitoru serĉas subtenon por tiu ebleco ĉe la sciencaj instancoj en Iaşi. Fakte mi ĵus ricevis informon, ke tia kongreso eblas, kvankam ne ankoraŭ estas interkonsento pri datoj. Kutime niaj kongresoj okazas en aŭgusto aŭ septembro, ĉar tiam universitatanoj estas liberaj en la plimulto de eŭropaj landoj. Kelkaj tagoj antaŭ aŭ post la AIS-sesio en San Marino estus verŝajne la plej konvena tempo.
Denove ni estas en la jartempo por pripensi pagadon de kotizoj. Verŝajne la plej konvena maniero fari tion estas doni permeson, ke ni deprenu la dek markojn de via konto ĉe AIS (por tiuj, kiuj havas tian konton. Aliajn ni kuraĝigas malfermi tian konton.) Tial mi kunsendas formularon, kiu subskribita kaj resendita de vi donas al ni tiun permeson.

afable via,
Dan Maxwell
Prezidanto de TAKIS

ĉeestantaj membroj: Prof.D-ro Helmar Frank, ADoc. Dan Maxwell,dr, ADoc. Mariana Preotu, ADoc. Ana Vrăjitoru

1. Oni diskutis pri la estonta kongreso de TAKIS. Unu ebleco estas IAŞI, Rumanio. Preotu kaj Vrăjitoru esploros la eblecon trovi surlokan subtenon. Aliaj eblecoj menciitaj estas Prago kaj Budapeŝto. Prof. Frank diskutos kun Prof. Miloš Lánský en Prago kaj kun D-ro Ilona Koutny pri Budapeŝto. La fina decido okazos en la venontaj monatoj fare de Maxwell.
2. TAKIS nun oficiale apartenas al la unua sekcio de AIS. Estontaj cirkuleroj de la dekano, same kiel estontaj novaĵleteroj de TAKIS, estos senditaj al la membroj fare de la TAKIS-sekretario en Poprad (CS).
3. Dum la lasta TAKIS-kongreso en Poprad, la ĉeĥaj TAKIS-anoj faris traduklaboron por kelkaj prelegoj. Estis decidita kompensi ilin per decidenda kvanto de AKU en ilia AIS-konto.

protokolis Dan Maxwell kaj Mariana Preotu

( ) Jes, vi rajtas depreni mian TAKIS-an kotizon per subtraho de 0,1 AKU (= 10,– DM) de mia konto ĉe AIS ĉiun jaron ĝis mi retiras tiun permeson. Bonvolu regule informi min pri ĝia bonhavo.

( ) Mi ankoraŭ ne havas bonhavon ĉe AIS, sed intencas nun malfermi tian konton per sendo de mono.

Nomo(tajpita aŭ legeble skribita):

Subskribo:

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'un même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.